Domaszék, 17a de julio 2022

Luko 10:38-42
Gen 18:1-10a

Karaj gefratoj,

La teksto, kiun mi provos aktualigi por vi hodiaŭ estas la evangelia teksto hodiaŭa kaj de la katolika listo kaj de la listo de mia Eklezio, unuiĝinta reformita kaj luterana.

Tiu peco el Luko venas post la rakonto de la parabolo de la "Bona Samariano".
Responde al demando farita al Jesuo pri kion fari por heredi eternan vivon, li renversis la aferon kaj demandis la homon, leĝiston kiu bone konis la leĝon, la Toraon. Tiu bone respondis per la duflanka resumo de la leĝo. Li denove demandis Jesuon ĉifoje pri kiu estas mia proksimulo. Jen la parabolo kies konkludon diris Jesuo : faru tion saman.

Ni ne forgesu tiun diron de Jesuo, kiam ni alvenas al la hodiaŭa rakonto.

Li eniris en unu vilaĝon. Neniu nomo. Tamen, dank'al la evangelio laŭ Johano ni konas la nomon, Betania.
Poste la evangeliisto indikas : kaj virino, nomata Marta akceptis lin. Kvankam ofte tradukita, ankaŭ en Esperanto, la mencio pri la akcepto en ŝia domo ne troviĝas en la plej bonaj manuskriptoj, tamen oni povas supozi tiun akcepton. Oni ankaŭ konas la nomojn de kelkaj kiuj akceptis Jesuon en sia domo : Zakĥeo, Simon la fariseo, eble la sama kiel Simon la leprulo.
Tiun nomon, Marta, Jesuo uzas dufoje kiam li respondas al ŝia peto. Ŝia nomo, aŭ kromnomo, signifas "sinjorino" aŭ "dommastrino", kaj tiel ŝi agas.

Iu inter ni aludis al la akcepto de la "anĝeloj". El tio oni komprenas ke akcepto de gasto estas devo.

La teksto daŭrigas tiel : Ŝi havis fratinon, vokitan Maria. La teksto uzas alian vorton, ne "nomata" sed "vokita". La diferenco ne aperas en la Esperanta traduko. Tio ankaŭ portas indikon pri Maria. Ŝi estis vokita, ŝi ricevis alvokon. La nomo mem estas tre komuna, sed notinda estas la elekto de tiu verbo voki.

La rabeno, tiu kiu parolas, kiu instruas, kutime tiam sidis. Kaj la aŭskultantoj ankaŭ. Maria sidis antaŭ li, apud liaj piedoj, privilegia situacio. Oni povas tiam rimarki, ke en tiu tempo, ankaŭ la virinoj havis la eblecon aŭskulti la majstrojn, studi la leĝon, kleriĝi.

Marta sentis sian devon en la servado, kiel ŝajne ŝia nomo indikas. Sed la teksto estas pli tikla. Ŝi estis distrata pro multo da servado. De kio ŝi do estis distrata, se ne de la aŭskultado. Ŝia sento ke ŝia devo estis servado, kion ŝi certe volis tre bone fari kaj ke tiu servado estis grava, nepra. Sekve, ŝi ne komprenis la sintenon de sia fratino, kaj eĉ ne komprenis ke Jesuo ne rimarkis tion. Ŝi preskaŭ riproĉis la majstron pri tiu ne-rimarko.

Jesuo respondas al ŝi, uzante dufoje ŝian nomon, aldonante la zorgon kaj klopodon de Marta. Li indikas ke nur unu afero estas necesa. Alia variaĵo en la teksto diras ke eteta (greka *oligos)* afero estas necesa. Tamen, li ne indikas kio estas tiu necesa afero. Oni nur povas supozi.
Ebla respondo troviĝas en la Torao, en Readmono 8:3 : *ne per la pano sole vivas homo, sed per ĉio, kio eliras el la buŝo de la Eternulo, homo povas vivi.*

Jesuo krome diras ke Maria elektis la bonan parton. La teksto ankaŭ ne diras pri kio temas. La teksto same ne diras "pli bona" sed bona. La solvo eble estas ankaŭ en la antaŭa citaĵo.

Oni legas ke Marta konfesis : *Mi kredas ke vi estas la Kristo, la Filo de Dio, la venanta en la mondon*. Tio estas en Johano 11:27. Ŝi estas unu el la unuaj kiuj konfesas kredon, kaj ŝi estas virino. Marta ne estas nur tiu dommastrino kiu volas plejbone servi. Ŝi ankaŭ estas fidela disĉiplo.

Ŝia fido en Dio kaj en Jesuo, ŝia fideleco, estas same certaj kiel ĉi tiu de Maria. Ili estas du aspektoj, du flankoj de la fido en praktiko ; religio de farado kaj religio de aŭskultado. Tamen la aŭskultado estas unua, cele al la proklamado kaj al la servado.

Maria, laŭ la tri aliaj evangelioj, dum iu manĝo, prenis vazon de pura narda ŝmiraĵo kies odoro plenigis la domon, verŝis ĝin ĉu sur la kapo, ĉu sur la piedoj de Jesuo. Tiel ŝi anoncis, senkonscie, la morton de Jesuo. Ŝi estis kiel celebranto, pretigante la oferon. Ŝi ne nur aŭskultis, sed ankaŭ plenumis riton kaj tiel esprimis sian fidon.

Mi devas aldoni, ke simila epizodo, en Luko plej verŝajne rilatas al alia virino, kiu cetere same ne estas la alia Maria, Maria de Magdala. En la postaj bildoj, la artistoj miksis la tri, kaj erare reprezentis Marian de Magdala, ĉe la kruco, kun vazo de parfuma ŝmiraĵo apud ŝi.

Tiuj du personoj, la fratinoj de Betania, Marta kaj Maria, estas du figuroj de kredantoj, kaj ne estas hazardo ke ili estas ambaŭ virinoj. Ili estis amikoj de Jesuo apud ilia frato Lazaro. Fakte ĉiu kredanto estas kaj Marta kaj Maria, aŭskultanto kaj aganto, kredkonfesanto kaj celebranto. Sed ili ne estas nur modeloj, ili ankaŭ estas personoj, kun siaj karakteroj. Kaj tiujn karakterojn bone konas Jesuo.

Same Jesuo bone konas niajn karakterojn. Ni ne dubu pri tio. Ni do sciu kio estas la bona parto, bona por ni mem, sed ankaŭ bona por la aliaj. Ni tute fidu al Kristo kaj al Dio kaj al la Spirito, ne pensante ke per niaj zorgoj kaj klopodoj ni povas antaŭen puŝi la efektivigon de la Evangelio, de la Regno de Dio. Ni ankaŭ konfesu nian kredon kaj celebru la savagadon de Kristo.

Ĉiu kristano, ĉiu disĉiplo, havas sian propran karakteron, sian propran identecon, kiun bone konas nur Dio. La proklamata Evangelio rilatas al nia tuta propra personeco. Ĝi celas la renovigon, la revivigon, la releviĝon de la tuta homo, de la tuta personeco por atingi la veran rilaton kun Dio, en fido kaj servo.

Amen.